

LA ESPERO
SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN
NUMMER 2/76

La Espero



Redaktoro

ATENO: «LULILO» DE LA OKCIDENTA KULTURO

La 61-a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Ateno.

Ateno! Kiajn imagojn vi havas, pri kio vi pensas, kiam vi aŭdas tiun nomon? Ĉu vi ne havas, iam, la sekretan revon, ke vi mem iam vizitu la lokon, kie staris la «lulilo» de la okcidenta kulturo? La revon vagi sur la stratoj, mem vidi la famajn lokojn, kie iam naskiĝis la okcidenteŭropa nocio «demokratio»? Greka vorto!

Ĉu vi pensis pri tio, ke tiu demokrata periodo estis efektive tre mallonga periodo en la historio de la homaro? Ĝi eĉ ne estis demokratio en tia senco, kiel ni nuntempe komprenas tiun vorton.

Ĉar la demokratio de Ateno estis fakte nur demokratio por tre malvasta rondo, por riĉa supera klaso. Tiuj urbanaj kiuj kolektiĝis por diskuti kaj decidi pri la sorto de Ateno ne multe laboris. La laboron faris iliaj sklavoj, kaj por *tiuj* ne ekzistis ia libereco. La demokratio ne estis por ili.

Eĉ la virinoj ne posedis tiun liberecon, kiun ili albatas al si en niaj tagoj. La loko de la virinoj estis en la hejmo. Ili ne partoprenis la kunvenojn, en kiuj iliaj edzoj solaj faris la gravajn decidojn. Ne estis demando pri egaleco inter la seksoj.

Kaj la viroj okupiĝis pri senfinaj diskutoj. Tio eble estis la malforta flanko de la greka demokratio, kaj ĝi ankaŭ baldaŭ perdiĝis. Eĉ la greka lingvo ne disvastiĝis ĉefe pro la demokratio de Ateno kaj aliaj grekaj urboj. Ĝin disvastiĝis la armiloj, la armiloj de reĝo, kiu eĉ ne estis vera greko: Aleksandro la Granda el Makedonio.

Kaj tamen! Neniu povas nei, ke tiu mallonga demokrata periodo de Grekujo havis grandegan influon al la historio de la Okcidento. Ĉar la valoroj de la greka demokratio, la kulturo, estis veraj. Ne nur la greka lingvo disvastiĝis per la armeoj de Aleksandro; dis-

vastiĝis la valoroj, la pensmanieroj, la respekto al la homo kiel individuo.

Ĉu vi pensis pri tio, ke la ideoj de malgranda grupo, de eta socio, povas havi pli grandan influon ol meritus la grandeco de la grupo? De post la tempo de la demokrata epoko de Ateno la homaro spertis longajn malhelajn periodojn en sia historio. Niaj demokratioj — kiuj ja ankaŭ tute ne estas perfektaj — evoluigis pli ol du mil jarojn post la demokratio de Ateno. Sed la ideoj transvivis tiujn malhelajn epokojn. Ili vivas ankoraŭ hodiaŭ.

La esperantistoj, kiuj kongresos en Ateno, ankaŭ estas grupo tre malgranda, kompare al la rapide kreskanta nombro de enloĝantoj en la hodiaŭa mondo. Ĉu ni en tiu maniero influas al la ekstera mondo? Ĉu ni ion signifas por la homaro?

Mi ne scias. Sed mi scias, ke ĉiu vera esperantisto estas influata de la kulturo de esperanto. Ĉar la esperantomovado sendube havas en si iun internacian kulturon, kiu estas aparta por ĝuste nia movado. Ĉu ne estas io en tiu kulturo, kio igas vin labori — ankoraŭ, persiste — por esperanto?

Kompreneble ni ne tro alte taksu nian signifon. Granda parto de la ekstera mondo eĉ ne rimarkas nin. Ankoraŭ! Sed ni ankaŭ ne subtaŭks nian rolon. Ĉar ĉiu esperantisto, ĉiu grupeto, iel kaj iom influas al sia ĉirkaŭaĵo.

Kaj ne malesperu, se ni ankoraŭ ne atingis nian celon! Esperanto ja ekzistis eĉ ne cent jarojn. La ideoj de la greka demokratio bezonis milojn da jaroj gis maturiĝo kaj efektiviĝo en pli vasta mondo — se oni povas aserti ke ili ankoraŭ efektiviĝis. Sed ideoj, veraj ideoj, neniam mortas!

Pensu pri tio, kiam vi vizitos la historiajn lokojn de Ateno!

Ake Blomberg

JUBILEO: EBBE VILBORG 50-JARA

Kiam la unua numero de *La Espero* 1976 troviĝis jam ĉe la presejo, telefonis al mi la prezidanto de SEF kaj atentigis, ke denove ni forgesis gravan jubileanton. La aŭtoro de la nova vortaro, Ebbe Vilborg, Göteborg, fariĝis 50-jara la 14-an de februaro.

Mi ne estas certa, ĉu Ebbe Vilborg atendis aŭ eĉ deziris, iun mencion en *La Espero* pri lia datreveno. Miaj duboj kreskis, kiam mi telefonis al kelkaj samideanoj en Göteborg por havigi informojn pri la jubileanto. Montriĝis, ke ili ne multon scias. Li havas apartan interenson pri lingvoj, instruas la grekan lingvon ĉe la universitato de Göteborg, fariĝis docento, havis dum kelka tempo provizore la postenon de profesoro. Li interesiĝis pri esperanto jam en frua junaĝo, estas prezidanto de la Esperanto-Asocio de Gotenburgo, membro de la Akademio de Esperanto.

Multon pli ili ne scias, kaj mi tute ne miras pri tio, ĉar Ebbe Vilborg estas tre modesta homo, kiu ne speciale ŝatas atenton pri sia persono. Sed li estas sendube tre eminenta lingvisto kun profundaj scioj pri la strukturo, historio kaj evoluo de esperanto. Persona modesteco kaj vastanima toleremo cetere ne malhelpas al li firme defendi siajn vidpunktojn, speciale kiam temas pri lingvaj demandoj: en la diskutado pri -ata/-ita li definitive apartenas al la ata-istoj, fakto, kiu eĉ havigis al li malamikojn, io kion li certe tre bedaŭras.

Por la nova sved-esperanta vortaro li estas sen ia dubo la plej kompetenta persono disponebla, kaj la sveda esperantomovado ŝuldas al li profundan dankon ke li volis entrepreni tiun penigan kaj temporaban laboron. Se vi deziras postfeste ĝojigi lin, vi sendu al li sugestojn kaj kritikojn pri la nova vortaro, volonte surbaze de la pasintjare eldonita suplemento. Adreso: Ebbe Vilborg, Prästgårdsgängen 2, S-412 71 Göteborg.

Ake Blomberg

VERKOJ DE KALOCSAY

i vårt lager för omgående leverans:

EZOPAJ FABLOJ	16:00
TRAGEDIO DE L' HOMO (Madach)	16:50
LIBERO KAJ AMO (Petöfi)	12:25

i ett fåtal exemplar:

JOHANO LA BRAVA (Petöfi)	7:50
LINGVO STILO FORMO	8:50
PARNASA GVIDLIBRO	15:75
(Kalocsay, Waringhien, Bernard)	
ORA DUOPO	14:75
(boken om Kalocsay och Baghy och deras verk)	

ESPERANTOFÖRLAGET
Fack, 200 42 Malmö, Postgiro 578 - 5

La vortcasisto

Ebbe, nia docento kun delikata sento pri lingvo Esperanta, tute ne vanta.

Virtuoza anatomo kun konata nomo frazojn operacias elokvente klarigas.

Lingve lerta estas sed modesta restas -- respondas afable al ĉiu verdulo, nia brava, bonkora spertulo.

Jim Hornö.

KALOCSAY: MORTIS NIA GRANDA POETO

Kolomano Kalocsay mortis la 27-an de februaro 1976, 85-jara.

La informo ĵus atingis nin per «Budapeŝta Informilo», marta numero, kies unua paĝo kun la portreto de Kalocsay en nigra kadro lastmomente mallonge informas.

Ankaŭ nin atingas la informo je la finpreparo de tiu ĉi numero. Alie iu pli kompetenta persono ol mi — antaŭ ĉio Tiberio Morariu — devus verki ĉi tiun memoran artikolon. Sed en iu venonta numero ni donos pli da spaco al la verkaro de Kalocsay.

Ĉar forlasis niajn vicajn unu el niaj plej grandaj poetoj kaj lingvaj artistoj, eble eĉ la plej granda. Kalocsay havas unikan pozicion en nia esperanta literaturo, kaj lia influo al la evoluo de nia lingvo kaj nia literaturo estis senkompare granda.

Ne necesas ĉi tie redoni liston de liaj verkoj — memoru nur pri la tradukoj de **La Infero** de Dante kaj de la hungara klasika drama poemo **La tragedio de l' homo** aŭ elektu el lia originala verkaro poemon kiel **Sonorilludo**, per kiu li brile montras kion granda artisto povas krei per la lingvo, pri kiu ankoraŭ hodiaŭ neinformitaj «intelektuloj» kredas, ke ĝi ne taŭgas por literaturo kaj poezio:

— — — — —
*Ho, svingu la langon,
Vi tondre batanta!
Lamento giganta
Traringu la landon!
Priplendu la honton
De mondhekatomboj,
Per plendo pri tomoj
Ekfendu la monton!
Estingu flamlangon
De l' monstro malinda,
Longunga kaj blinda,
Sorbinta la sangon!*
— — — — —

Eble pli indas, anstataŭ nun verki longan artikolon pri Kalocsay, citi kelkajn strofojn el poemo, kiun li mem verkis je la morto de alia granda poeto, Grabowski, en 1921. Tiuj strofoj hodiaŭ povas aludi al Kalocsay mem:

*Ho, rimoj Esperantaj, nun tintu kun esploro,
Tra l' mondo portu grandan doloron voĉo via,
Ĉar mortis via Majstro grandpova kaj genia,
per kiu vi pleniĝis de vivo kaj sonoro.*

*Ho, Muzo Esperanta, en la angul' vi sidis,
En vestoj senornamaj, al Cindrulin' simile,
Li vestis vin per silko, vin perlornamis brile,
kaj prenis vin ĉe mano, kaj vin solene gvidis.*

*En halon de la Arto, en templon de la Belo,
sur via lir' li streĉis argentonsonorajn kordojn,
Kaj li agordis ilin, ke frapu vi akordojn
Pli mugajn ol tempesto, pli dolĉajn ol mielo.*

*Ho, Muzo Esperanta, do ne sidadu mute!
Se nur pro viaj larmoj eĉ malstreĉiĝis kordoj,
Ekfrapu ilin tamen, eksonu la akordoj
Obtuze, surde, ĝeme, funebre surliute.*

*Kaj se la kant' funebra forlarmis kaj forbruis,
Relevu la flugilojn, denove ekflugiru,
Ektuŝu novajn korojn, instigu kaj inspiru,
Kiele vin la Majstro dum sia viv' instruis.*

*Ke rimoj Esperantaj ektintu kun sonoro!
Nur ili povas inde lin glori kaj memori,
Nin li instruis verse ekridi, verse plori,
Do estas ĉiu nova rim' ja lia nova gloro!*

Kalocsay estis ĉefkuracisto ĉe granda mal-sanulejo en Budapeŝto kaj universitata profesoro; verŝajne tre lerta kuracisto. Se li anstataŭ estus elektinta fariĝi poeto en sia nacia lingvo li kredeble estus havinta elstaran lokon en la hungara literaturo.

Eble ni esperantistoj devas esti dankaj, ke tio ne okazis, ĉar tiam li eble ne estus trovinta tempon kaj fortojn por esperanta verkado.

Kolomano Kalocsay estas mortinta, sed vivos liaj verkoj tiom longe kiom vivos la lingvo Esperanto!

Åke Blomberg

TILL ATEN

Aten är ingen vanlig stad. En världskongress i Aten blir inte heller en vanlig världskongress. Kom med och upplev den!

SKANDINAVISK KONGRESSRESA

Liksom tidigare är anordnad Esperantoförbundet även i år en skandinavisk kongressresa till världskongressen. Traditionenligt sker detta i samarbete med Komunaj Esperanto-Kongresvojaĝoj. Reseledare blir Gustav Kühlmann.

MED FLYG TILL ATEN

Resan sker med flyg från Köpenhamn/Kastrup. Avresa onsdag 28 juli kl. 8.50, ankomst åter till Köpenhamn/Kastrup onsdag 11 augusti kl. 18.10.

TVÅ HELA VECKOR I ATEN!

Före världskongressen lär du dig känna Aten och omgivningarna. Under kongressveckan får du välja fritt bland alla kongressens arrangemang. När kongressen är slut, får du vila upp dig på en badstrand, kanske resa till någon av öarna eller delta i något av efterkongressens arrangemang.

1230 SKR FÖR TVÅ VECKOR!

Resa, logi på hotell i närheten av Hilton (på Hilton kommer invigningen att äga rum), frukost och ett huvudmål på hotellet, t o m resan tillbaka: allt detta kostar inte mer än 1230 skr (1700 dkr) för två hela veckor! Vill du ligga i enbäddrum, kostar det 220 skr (300 dkr) extra.

ANSLUTNINGSFLYG

Från Stockholm/Arlanda och Oslo/Fornebu finns möjlighet till direkt förbindelse med Kastrup mot 175 skr tur och retur.

VAR ANMÄLER DU DIG?

Du kan anmäla dig hos Gustav Kühlmann, Lovetandsvej 31, DK-2700 København-Brh, som åtagit sig att sköta alla detaljer om resan. Det kan du göra enklast genom att sätta 200 dkr (obs! danska kronor!) på hans danska postgiro 5 47 06 17 före den 30 april. Så fort du har gjort det, får du ett särskilt meddelande med nödvändiga upplysningar om resan.

BEGRÄNSAT ANTAL PLATSER

Eftersom antalet platser är begränsat, anmäl dig så fort du kan genom att betala anmälningsavgiften på 200 dkr. Den resterande summan får du vänta med att betala till 15 juni (senast).

ANMÄL DIG TILL VÄRLDSKONGRESSEN

Till världskongressen måste du anmäla dig separat, om du inte redan gjort det. Du får anmälningsblankett från Ester Andrén, Regementsgatan 27 D, 217 53 Malmö. Du hittar upplysningar om avgifter m.m. i La Espero 6/75.

ESPERANTOFÖRBUNDET

SKELLEFTEÅ: SÅ HÄR ANMÄLER DU DIG

Om du vill ha hotellrum i Skellefteå, måste du anmäla dig **senast 15 maj**.

1. Bara årskongressen

Du som bara tänker delta i Esperantoförbundets årskongress, lördag — söndag 12 — 13 juni:

Deltagaravgiften är 25 kr (ungdomar 10 kr). *Hotellrum* reserverar du på inbetalningskortet. Reservationen kostar 15 kr. Övernattningen betalar du till hotellet, räkna med 50 — 60 kr i enbäddsrum eller 75 — 90 kr för två personer i dubbelrum.

Anmälningen gör du på postgiroblanketten till pg 20 12 - 3, Esperantoförbundet. Blanketten finns som bilaga i detta numret av tidningen, och du kan få fler från Esperantoförbundet.

POSTGIROT		Mottagardal
Meddelande till betalningsmottagaren		
<input checked="" type="checkbox"/>	Deltagaravgift 12—13 juni 1976	25 / 10—
<input type="checkbox"/>	Tilläggsavgift 14—18 juni 1976	75 / 30—
<input type="checkbox"/>	Utfärd 18 juni natten: 75—	
<input checked="" type="checkbox"/>	Hotellreservation, ankomst avresa	15—
Användare (namn och postadress)		

2. Stanna någon dag extra

Om du vill stanna någon dag extra och vara med på en del av IFEF-kongressen, kan du anmäla dig på samma sätt, men måste sätta ett kryss till på blanketten.

Tilläggsavgiften för att delta i IFEF-kongressen är 75 kr (ungdomar, pensionärer och familjedeltagare 30 kr).

Hotellrum reserverar du på samma sätt som ovan. Glöm inte att ange ankomstdag och avresedag.

JARKONGRESSO: SKELLEFTEÅ 12 — 13 JUNIO 1976	
PROGRAMO POR SABATO	
09.30	Jarkongresa akceptejo malfermiĝas
10.30	«Kion diris en la vero la finnaj edukinstancoj pri esperanto?» Pentti Järvinen rakontas
14.30	Jarkunveno de Sveda Esperanto-Federacio
19.00	Interkona vespero (IFEF-kongreso)
PROGRAMO POR DIMANCO	
08.30 — 10.30	Rondveturo en la urbo (IFEF-kongreso)
10.30	Sveda Instruista Esperantista Federacio
12.30	Eldona Societo Esperanto
14.00	Solena malfermo de la IFEF-kongreso

Anmälningen kan du göra på postgiroblanketten som finns i detta numret av tidningen.

POSTGIROT		Mottagardal
Meddelande till betalningsmottagaren		
<input checked="" type="checkbox"/>	Deltagaravgift 12—13 juni 1976	25 / 10—
<input checked="" type="checkbox"/>	Tilläggsavgift 14—18 juni 1976	75 / 30—
<input type="checkbox"/>	Utfärd 18 juni natten: 75—	
<input checked="" type="checkbox"/>	Hotellreservation, ankomst avresa	15—
Användare (namn och postadress)		

3. Delta hela veckan

Du är förstås välkommen att stanna hela veckan och delta helt i IFEF-kongressen 12 — 18 juni. Då kan du välja på två sätt att anmäla dig.

Anmälan till Esperantoförbundet kan du göra på samma sätt som ovan. Vill du vara med på den nattliga bussresan i slutet av veckan, betalar du in 75 kr för den, och kryssar i rutan för den.

Anmälan till IFEF-kongressen är en annan möjlighet. Då ska du använda en annan anmälningsblankett, som har sänts ut till alla

POSTGIROT		Mottagardal
Meddelande till betalningsmottagaren		
<input checked="" type="checkbox"/>	Deltagaravgift 12—13 juni 1976	25 / 10—
<input checked="" type="checkbox"/>	Tilläggsavgift 14—18 juni 1976	75 / 30—
<input checked="" type="checkbox"/>	Utfärd 18 juni natten: 75—	
<input checked="" type="checkbox"/>	Hotellreservation, ankomst avresa	15—
Användare (namn och postadress)		

klubbar och kan dessutom rekvideras från Esperantoförbundet eller från 28-a IFEF-kongreso, Hyttlidgatan 58 b, 931 00 Skellefteå. En fördel med att anmäla sig direkt till IFEF-kongressen är att den disponerar billigare logi för hela veckan.

Årskongressen

Esperantoförbundets (SEFs) årskongress ordnas varje år i maj eller juni. Viktigaste programpunkt är årsmöte för Svenska Esperantoförbundet. Dessutom brukar vi ha en diskussion eller ett föredrag, i Skellefteå om ämnet «Vad sa egentligen de finska utbildningsmyndigheterna om esperanto?». Ca 100 deltagare brukar det vara.

IFEF-kongressen

Järnvägsmännens internationella esperantoförbund ordnar en kongress varje år, och varje år i ett annat land. Kongressen i Skellefteå beräknas samla åtminstone 500 deltagare.

PROGRAMO: KION ILI DIRIS EN LA VERO?

Antaŭ jaro, subite, aperis informo en la esperanta gazetaro pri Finnlando. La finna lerneja administracio respondis negative al propono de finnaj esperantistoj, ke oni faru eksperimenton pri instruado de esperanto en la lernejoj. Kaj la kaŭzo de la negativa respondo: esploro estas jam farita en Finnlando, nome en Somero 1958 — 63. Kaj tiu esploro montris, ke la lernado de esperanto estas pli facila ol lernado de aliaj lingvoj.

Do, la finna lerneja administracio opinias, ke esperanto taŭgas kiel tria elektelebla fremda lingvo.

Kiel estis farita la esploro, kaj kion ĉi signifas por la estonteco? Kaj kion en la vero diris la finnaj administraciuloj?

Pentti Järvinen, finna instruisto, rakontas pri tio en la jarkongreso en Skellefteå. Li faros tion jam en la sabato matene (posttagmeze li devos jam denove forveturi).

Post lia enkonduko ni havos kiel kutime diskuton pri la svedaj lernejoj kaj lokaj kontaktoj — ideoj, personaj opinioj, interŝanĝo de spertoj, laŭ la eblecoj. Kio okazis el la kampanjo por informado en lernejoj, kiun ni provis fari antaŭ kelkaj jaroj? Ĉu ni bezonas pliedukiĝi por la tasko? Ĉu ni deziras havi pli da materialo, bildoj, afiŝoj...? Ĉu ni eble estas tro timemaj?

Jarkunveno: statuto denove

En la posttagmeza jarkunveno estos la kutimaj eroj: jarraporto, kasraporto, elektoj. El la pasintjara kunveno restas ankoraŭ la tasko

konfirmi aŭ malakcepti la novan statuton.

Interkona

La IFEF-kongreso komenciĝas la saman tagon, kaj por ĝi oni atendas almenaŭ 500 partoprenantojn el diversaj partoj de la mondo.

La jarkongreso de SEF kompreneble pruntas kelkajn erojn el la programo de la IFEF-kongreso. La unua el tiuj programeroj estas la Interkona vespero en la sabato.

Ankaŭ rondveturo en la urbo Skellefteå estas en la programo por la IFEF-kongreso, same kiel la solena malfermo.

Solena malfermo

Al la solena malfermo en la posttagmezo de la dimanĉo oni invitis ankaŭ observantojn el la urbo Skellefteå.

Per tiu malfermo de la IFEF-kongreso iamaniere ni fermos la SEF-kongreson. Eble ni ne diru, ke ni fermos ĝin — ĝi nur transglitos en la internacian kongreson. Tiuj, kiuj deziras, ja povas resti iun aŭ plurajn tagojn kontraŭ malgranda kroma kosto.

Jam en la vespero estos folkloro programo por tiuj, kiuj ne devas ekveturi hejmen.

La kosto

Estas vero, ke la vojo estas longa al la nordo, se oni loĝas en suda Svedio. Kaj ke la bileto estas multekosta. Sed la tuta kosto de partopreno certe ne estos pli alta ol kutime ĉe jarkongreso: nur unu tranokto en hotelo, kaj neniu multekostaj festaj aranĝoj.

SPRÅKRESOR: ETT INLÄGG TILL STATLIG UTREDNING

Kaj Stridell i Västerås har skrivit till Kommunikationsdepartementet och framfört vissa synpunkter på studieutredningen (se även rapporten om riksdagsman Doris Håviks framträdande inför Göteborgs esperantister i klubbkrönikan). På uppdrag av Esperantoförbundets styrelse har Märtha Andréasson skrivit ett remissvar i samma fråga. Vi tycker att några delar av Kaj Stridells brev är värda att återges här:

Jag har med intresse tagit del av ovan nämnda utredning. Den verkar vara väl genomtänkt i många avseenden, men eftersom vi människor är så olika, så tänker vi olika. ---- Jag tänkte, att det kanske kunde vara intressant för utredarna, att få ta del av vad en «automatstämning», men ändå varande mitt uppe i det, vanlig människa tycker.

Denna vanliga människa är alltså jag, fyrtiofemårig folkskollärare, som även undervisar i engelska, och som alltid varit intresserad av internationella frågor. Eftersom jag är politiskt neutral har jag alltid strävat efter

RESTIDER: TILL SKELLEFTEÅ I JUNI

Från Stockholm

Tåg fredag kväll kl 20.10, ankomst Skellefteå lördag morgon kl 8.57.

Återresa söndagkvällen kl 19.15, ankomst Stockholm kl 8.15.

Biljetten kostar för närvarande 323 kr tur och retur.

Från Göteborg

Ett lämpligt tåg avgår mot Stockholm kl 13.55 på fredagen. Vidare från Stockholm kl 20.10.

Det finns direkt sovkvagn från Göteborg kl 20.20, som är framme i Skellefteå kl 13.18, alltså för sent för SEFs årskongress.

Återresa från Skellefteå kl 16.04, byte i Bastuträsk kl 17.13, ankomst till Göteborg kl 8.55 på måndag morgon.

Biljetten kostar 361 kr tur och retur.

Från Malmö

Avresa fredagen kl 12.10, ankomst till Skellefteå kl 8.57 lördagen.

Alternativ: specialvagn kl 16.25 på fredagen 11 juni, ankommer Skellefteå kl 13.10 lördagen. Beställ platsbiljett med anteckningen «Esperanto». Även med detta tåg kommer du för sent till SEFs årskongress.

Återresa kl 19.15 söndagen, ankommer Malmö måndag kl 15.50 (byte i Stockholm). Alternativt avresa redan 9.10 söndagen, ankomst Malmö 7.08 (byte Gävle).

Biljetten kostar ca 386 kr tur och retur.

Flyg

Flygplats finns i Skellefteå. Ungefärliga priser fram och åter: Stockholm 660 kr, Malmö 820 kr.

att belysa problem ur flera, och ibland originella synvinklar.

Det är frapperande, hur enkelt det är att halka in i vanemässigt tänkande, baserat på nuläget, och utan tanke på att förändra skeendet alltför dramatiskt för att eventuellt nå ännu «bättre» mål. Till exempel:

Vilka språk undervisas just nu i Sverige? Jo, i tur och ordning engelska, tyska och franska. Vad drar utredningen för slutsats av detta? Jo: (st. 3.3., sid 92). «De länder, som kan komma ifråga för studieresor måste i första hand bli engelsktalande länder och därefter tysk- och fransktalande länder».

Men (sid 69, st 3.1) «Det internationella beroendet har blivit större. Värden har krympt.» Då frågar man sig: Har världen verkligen krympt så mycket, att den bara omfattar engelsk-, tysk- och fransktalande länder?

Det är alldeles sant att hittills har dessa länder dominerat vår kultur och ekonomi (och kanske kan man ur villa synpunkter försvara kravet på kunskaper i engelska för vissa universitetsstudier på grund av att en hel del av den för närvarande använda utländska litteraturen är på detta språk), men se hur snabbt utvecklingen går. Se på «tredje världen!» För några år sedan spekulerades det i, om man borde satsa på att lära sig ryska eller i o m kinesiska, men just nu ser det ut, som om en period av arabiska vore det säkraste tipset. Hur länge det nu varar ...

(sid 72, 3.1.1.) «Internationella kontakter bidrar vidare till att ge ökade möjligheter för ett rikare kulturliv», och (sid 73, 3.1.3.) «utbildningsmål kan sammanfattas (bl.a.) öppenhet, förståelse och respekt för alla folk, deras kultur, värderingar och levnads-mönster.»

Har utredarna inte hört talas om, vilken «het potatis», som det engelska språket har blivit i forna engelska kolonier? Vid Indiens frigörelse på sextiotalet gick man ifrån engelskan och skapade ett eget indiskt bland-språk. Och så sent som förra året förbjöd Jomo Kenyatta att engelska skulle få användas inom det kenyanska parlamentet, utan man skulle i fortsättningen yttra sig på swahili. Vilket ställde till en hel del trassel för sådana kenyaner, som var hemtama med engelska men knackiga på swahili.

«Vi», d v s genomsnittssvenskarna, lever alltså med den uppfattningen, att Kunskap i Engelska Språket är Nyckeln till Framgång, oavsett inom vilket område, medan å andra sidan nationella rörelser i flera länder vänder sig mot användandet av stormakternas språk (även ryskan och kinesiskan ut-sätts för samma kritik i vissa av österns länder).

Ska man tänka internationellt måste hänsyn tas till alla nationaliteter, inte bara stormakterna. Och det kan bara göras genom att man ger alla tillfälle att lära sig ett rent neutralt språk som första alternativ vid internationella kontakter. Då duger alltså (av känslomässiga skäl) inget nationalspråk. Av de alternativ som finns, är det väl bara Det Internationella Språket, även kallat Esperanto, som har nått någon position av betydelse och som visat sig vara det enda praktiskt användbara planspråket.

Men såvitt jag kan förstå, finns det ingen plats för esperanto i Ert språkresoprogram. Det är diskriminerande, att tre nationalspråk favoriserar ur studie- och kostnadsynpunkt, när det gäller internationella studier, medan man helt glömt bort det internationella språket självt!



SEJU har årsmöte på vandrarhemmet Lövudden i Västerås den 8 och 9 maj. Kom, du som är SEJU-medlem eller känner dig som sådan!


Kostnad för mat och logi blir ca 90 kr. Sänd din anmälan till SEJU, Fack, 122 04 Stockholm-Enskede.

Billiga böcker för vår- kvällarna efter kursen

Vivo vokas av Stellan Engholm, en berättelse om ungdomar inb	11:75
Amuzaj dialogoj	10:90
Esperanta legolibro	14:60
Disko av H. Rosbach	11:45
Ŝipestro rakontas, en svensk sjökapstens minnen, enkel text	inb. 11:75
	häftad 8:80


Priserna inkluderar moms.

ESPERANTOFÖRLAGET
Fack, 200 42 Malmö, Postgiro 578 - 5





SALUTON, ATENO!



Oni diras, ke oni komencu viziton al Ateno per vizito al la monto Lykabetos. Ĝi estas unu el la du altajoj en la urbo. La alia estas Akropolis. De Lykabetos oni havas belan superrigardon al Akropolis kaj al la tuta centra parto de la urbo.

Oni povas facile difini, kio estas la centro de Ateno: ĝi troviĝas ĉirkaŭ la placo Syntagma, kie la parlamentejo situas, kaj disvastiĝas en la direkton de la alia granda placo, Omonia. En tiu ĉi centro troviĝas la plej multaj hoteloj, la vojaĝagentejoj, la plej grandaj butikoj, restoracioj kaj amuzejoj.

Sur la placo Syntagma oni povas sidi en la vesperoj trinkante tason da kafe aŭ mangante refreŝigan glaciaĵon. Ekzistas laŭdire pli ol tri mil seĝoj sur Syntagma.

Alia centro estas la arkeologia centro de Ateno, sur kaj ĉirkaŭ Akropolis. Vi devas nepre viziti la diversajn templojn sur «la alta urbo» (tion signifas Akropolis) kaj la malnovajn grekan kaj romtempnan merkatojn, «agora».

Vi ne povos eviti viziti la malnovan urbon, Plaka. Ĝi situas super la ruinoj de la malnova Ateno, kaj multaj arkeologoj certe ŝatus malkonstrui la malnovajn domojn en Plaka kaj fosi sub ili. Sed Plaka fariĝis turisma allogaĵo kun aro da malgrandaj restoracioj kaj dancejoj.

Viziton indas ankaŭ aliaj vidindaĵoj: multaj el la preĝejoj, ekzemple, konstruitaj jam en la frua mezepoko, kaj la multaj muzeoj. Turismaj gvidlibroj povas doni al vi utilajn informojn pri ili.

Se restas al vi iom da tempo, faru viziton al la maro. Veturu en tiu kazo relative longe for, ekzemple al Glyfada au Lagonissi — tie la akvo estas pli pura.

Vi faru ankaŭ viziton al la ĉirkaŭaĵo de Ateno, ekzemple al la mezepoka monaĥejo Dafni, aŭ pli longe for: al Mykene, al Delfi — sed ni haltu la menciadon de vidindaĵoj, ĉar nur per ili oni povus pleniĝi tutan gazeton.

Ateno povas esti varma en aŭgusto, sed la ĉambroj en la modernaj hoteloj estas freŝigitaj kaj ĉiuj lokaloj de la Universala Kongreso ankaŭ. Oni povos facile disponigi sian restadon tiel, ke oni estos ekstere matene kaj vespere; dum la tago oni partoprenos la kongresajn aranĝojn kaj ĝuos la freŝecon de la kongresaj salonoj.

Franko Luin

KLUBOJ: KRONIKO

Malmö

Klubo Esperantista de Malmö estas 70-jara en tiu ĉi jaro, kaj tiun datrevenon oni festos la 3-an de aprilo en la vespero. La redaktoro de La Espero mem ĉeestos, kaj eble venos raporteto en la venonta numero. Ni gratulas al la jubileanta klubo kaj ŝtelas la jenajn liniojn el «La Folio»:

Nia historio estas longa kaj havas multajn interesajn detalojn. Ni povas menciŭ nur kelkajn erojn: En 1948 ni ricevis la taskon aranĝi la 33-an Universalan Kongreson de Esperanto. Jam dum 46 jaroj aperis La Folio, la kluba informilo. Ni havas tute propran luitan klubejon, jam la kvaran dum nia historio. Ni havas tie eĉ propran telefonon, kiun eble neniu alia loka societo havas por si mem. (Jes, almenaŭ Göteborg, rim. de la red. de La Espero). Ni posedas riĉan bibliotekon, kiun aliaj envidias. La SEF-kongresojn ni plurfoje aranĝis. Ni partoprenis la fondiĝon de la skania (nun: suda) distrikto kaj ofte aranĝis ne nur la jarkunsideojn sed ankaŭ specialajn aranĝojn. Kun granda intereso ni de la komenco partoprenis la dan-svedajn esperantotagojn. Ni efike kunhelpis aranĝi Svedan Someran Semajnon plurfoje en Frostavallen kaj ni ... jes, ni povas daŭrigi diri multon.

Göteborg

Dimanĉe la 22-an de februaro oni aranĝis grekan vesperon okaze de la venonta U.K. en Ateno. Koloran filmon pri Greklando komentis Ebbe Vilborg - kiu vere estas spertulo pri tiu lando. Nelo Castillo kantis je liuto kaj dancistoj el la internacia popoldancista teamo prezentis dancojn. Tiu publika kunveno en la antaŭa Arbetarinstitutet en la centro de Göteborg i.a. kaŭzis grandan artikolon kun bildoj en la okcidentsveda eldono de la ĵurnalo Arbetet.

Iom tro malfrue ni raportas, ke la 7-an de januaro la Esperanto-Alianco de Gotenburgo en kunlaboro kun ABF (Laborista Kleriga Asocio) aranĝis kunvenon kun la parlamentanino Doris Håvik. Sia temo estis «Esploro pri lingvaj studvojaĝoj» kiun ŝi plejparte mem faris laŭ oficiala komisiio. Ĝi okupiĝas pri la eblecoj por diversaj kategorioj de lingvistudentoj ricevi ekonomian helpon por partopreni kursojn eksterlande. Ĝis nun tian helpon povas ricevi nur gejunuloj, studentaj ĉe la universitatoj, sed laŭ nova propono ankaŭ studentoj ĉe ABF aŭ aliaj klerigaj asocioj ricevos ŝtatan ekonomian helpon, tamen ne esperantistoj, ĉar «esperanto estas en neniu lando ĝenerale parolata». En la vigla diskutado, kiu sekvis post la prelego, Doris Håvik donis konsilojn, kiel ni agu por ŝanĝi tiun situacion.

Västerås

La Vek-a gazeto — informilo de la aktiva klubo de Västerås — aperigis en februaro numeron kun multe da informoj pri esperanta agado.

Anna Alamo-Sandgren estis tie kaj parolis pri «Vojaĝo en Bulgario — la lando de la

TIDNINGAR: VILKEN AV DESSA PASSAR DIG?

Att lära språk — det är svårt det!

Vi har inte haft det så lätt med svenskan heller. Det språket har de flesta av oss växt in i, växt ihop med från tidiga barnaår. Att lära ett främmande språk i vuxen ålder kräver mycken möda och tålmod. Vi säger ofta att esperanto är lätt, men det är en sanning med modifikation. Det är oerhört mycket lättare att lära än ett främmande nationellt språk, men även esperanto kräver sannerligen både arbete och tålmod. Det gäller ju dock att tillägna sig ett helt nytt ordförråd, att lära sig tänka i delvis andra banor.

Man brukar säga att det bästa sättet att lära sig behärska ett främmande språk tillfredsställande är att leva en tid i det land, där språket ifråga talas. Vi esperantister har inget sådant land. Vi är hänvisade till våra kurser, föreningsmöten då och då, och en internationell kongress en gång om året. Vi måste använda esperanto praktiskt taget varje dag; en liten stund varje dag gör underverk.

Använda esperanto, det kan man göra genom att korrespondera med brevvänner i utlandet, genom att lyssna på radio, genom att prata på esperanto med andra esperantister. Och så genom att läsa.

Det sista är nog det viktigaste så länge esperanto knappast alls förekommer i tv och radioutsändningarna är relativt få (endast Warszawa sänder dagligen). När det gäller att läsa kan du naturligtvis välja någon intressant bok. Och det bör du göra. Det finns mycket att välja på med olika svårighetsgrad.


Men det bästa sättet att få till vana att regelbundet läsa esperanto är nog att prenumerera på en tidning. En internationell esperantotidning — *La Espero* «slarvar» ju med artiklar på svenska.

Om du är ny esperantist, kan den här artikel kanske ge dig litet råd om vilken eller vilka tidningar som skulle passa dig. Men det finns säkert många «gamla» esperantister också, som kan ha nytta av att fundera över sina tidningsabonnemang. Du måste helt enkelt hålla dig med minst en esperantotidning förutom *La Espero* om du verkligen vill ha nytta och glädje av den tid du lagt ned på esperanto.

ESPERANTO

är namnet på Universala Esperanto-Asocios organ. Den får du som individuell medlem i UEA. (80 kr till postgiro 14 74 29 - 5, Esperantoförbundet, Specialkonto).

Esperanto utkommer en gång i månaden, tryckt på fint papper och rikt illustrerad. Den innehåller nyheter och artiklar i anslutning till esperantorörelsen, men också en del artiklar av allmänt in-



teresse. Tidningen redigeras i Rotterdam, där UEA har sitt huvudkontor.

Esperanto är kanske litet svår för nybörjare, för stilen är avancerad. Men du kan vara övertygad om att språket är mönstergillt och kvaliteten mycket hög. Så tappa inte humöret även om det skulle vara litet motigt i början. Dessutom bör du naturligtvis vara medlem i UEA om du vill vara aktiv esperantist.

HEROLDO DE ESPERANTO

var den första utländska esperantotidning som undertecknad själv lade sig till med i slutet på 30-talet, och nybörjare väljer gärna den. Den utkommer med 18 nummer på 4 — 8 sidor per år, i format något större än våra kvällstidningar.

Heroldo ser ut som kontinentens nyhetstidningar, och dess främsta syfte är också att förmedla snabba nyheter från den internationella esperantorörelsen. Det vimlar av korta notiser och småartiklar i den, och det är kanske inte minst orsaken till att den är så populär. Men den har också mera «tungt» material; just nu t. ex. en serie av Reto Rossetti «*Spegulo de esperantaj stiloj*» med utdrag ur olika esperantoförfattares verk. Och så har den en livlig insändaravdelning och en mängd korrespondensannonser.

Heroldo ges ut i Bryssel av en ekono-



misk förening utan vinstsyfte och redigeras av den polskfödda fru Ada Fighiera-Sikorska. Tidningen startades på 20-talet i Köln av Teo Jung och hette i början *Esperanto triumfonta*. Den har alltid varit självständig och inte dragit sig för att ta in kritik mot de «makt-havande» i esperantorörelsen.

Det har kanske inte alltid fallit i god jord, men vi i Sverige som är vana vid en fri press, uppskattar nog att det finns en helt fristående esperantotidning.

Heroldo kostar 43 kr per år hos Esperantoförlaget, Fack, 200 42 Malmö, postgiro 578 - 5.

KONTAKTO

är TEJOs organ. Tutmonda Esperantista Junulara Organizo är den till UEA anslutna internationella ungdomsorganisationen. *Kontakto* är i veckotidningsformat på 24 sidor, och den innehåller en hel del artiklar som ofta berör aktuella politiska och sociala frågor. Den är i högsta grad läsvärd för ungdom i alla åldrar, dvs även för dem som i likhet med undertecknad nått respektabel mogen ålder.

Kontakto kommer med fyra nummer per år, men tyvärr har utgivningen varit litet oregelbunden på senare år och man får vänta mycket länge på de olika numren. Ofta kommer två på en gång. Kostar 21 kr hos Esperantoförlaget.

OOMOTO

är en tidning i fickformat som kommer ut i Japan en gång i månaden, ofta dock dubbelnummer för två månader. Den är organ för den religiösa rörelsen Oomoto, som är ganska stor i Japan och som använder esperanto som sitt officiella språk. Tidningen har mängder av intressanta artiklar av allmänt intresse. 19:75 genom Esperantoförlaget.

SENNACIUOLO

är organ för Sennacieca Asocio Tutmonda (se artikel om SAT-kongressen i Göteborg i *La Espero* 1/1976) och kommer en gång i månaden. Den som vill läsa om aktuella politiska och samhällsreliga problem ungefär som i våra svenska tidningar ska prenumerera på *Sennaciulo*. I februari-numret 1976 hittar man en artikel om «Hispanio sen Franko», om «Moluka teroro en Nederlando», «Demokrata mastrumado» osv.

Artiklarna är i regel skrivna av personer som lever i respektive länder. Naturligtvis kan de ibland vara subjektiva och det gäller att studera tidningen kritiskt. Men det gäller våra svenska dagstidningar också, så det så.

Den språkliga nivån är mycket hög, och för rena nybörjare är kanske tidningen litet svår.

Man får den givetvis om man blir medlem i SAT, men det går också att prenumerera genom Esperantoförlaget. 51:50 per år.

ANDRA TIDSKRIFTER

Vi skulle kunna fylla spalt efter spalt i *La Espero* med korta upplysningar om alla de andra tidningar som kommer ut på esperanto. *Kulturaj Kajeroj* som kommer ut i Frankrike och *Literatura Foiro*, t ex. Vi har de rena facktidningarna som *La Mevo*, ornitologernas organ, *Internacia Fervojisto*, järnvägsmänens tidning alltså, och *Interligilo*, post- och telemännens. De båda senare har ofta mycket intressanta artiklar och vi brukar ibland «stjälja» från dem för *La Espero*. Och vi har dom rent politiska, t ex den mycket luxuösa och rikt illustrerade (i färg) *El Popola Cinio*. Den tidningen är läsvärd för dem som är intresserade av dagens Kina, oavsett vilken politisk åskådning man har. Den innehåller inte bara propaganda utan mycket som är av intresse. Dessutom återspeglar den rätt bra de politiska växlingarna i Kina, och det är ju intressant för den som gärna studerar internationell politik.

10 kr genom Esperantoförlaget.

Men utrymmet tillåter oss inte att ge fler exempel. Om den här artikeln har gett dig en liten «stöt», kanske just vad som behövdes för att du äntligen skulle komma dig för att abonnera på en eller flera utländska esperantotidningar, då är vi nöjda. Försök tränga in i esperantovärldens mångskiftande kultur. Att läsa tidningar ger dig faktiskt mycket mer än rent språkligt utbyte.

Åke Blomberg

rozoj» en kunveno aranĝita kune kun la Tomas-preĝejo. Kaj Stridell skribis leteron al la registaro — departemento por komunikiloj — kaj tiun ni komentas en alia loko en tiu ĉi numero.

Skövde

Ryszard Turowski el Pollando, nun loĝanta en Skövde kun sia familio, fariĝis nova prezidanto de Klubo Esperantista de Skövde je la jarkunveno fine de januaro.

La klubo en Skövde estas grupo kun multe da internaciaj kontaktoj, kaj dum la lastaj jaroj pluraj eksterlandaj esperantistoj restis dum kelka tempo en Skövde. La klubanoj mem multe veturas, kaj dum siaj vizitoj al Pollando ili starigis la kontaktojn, kiuj poste kaŭzis, ke la nova klubprezidanto ekloĝis en ilia urbo.

HUMORO: LA FESTENO

Estis lundo. Estis bela mateno. La suno jam brilis kaj la birdoj kantis kaj trilis.

Sur la vojo venis nevigla viro vagante. Liaj paŝoj estis pezaj kaj malrektaj. Estis Johano kiu venis el festeno ĉe najbaro. La festeno komenciĝis en la sabata vespero. Kaj nun estis lundo. Ho, tia festeno!

Hejmenveninte Johano kaŝiris al la kuir-ejo, kie la matenmanĝo ankoraŭ restis sur la tablo. Li sidiĝis kaj komencis manĝi. Sed tia pano! Ĝi ne lasis sin fariĝi maĉata. La tuta buŝpreno nur ruliĝis en la buŝo.

Johano palpis la dentojn per la fingro. Ne, li ne trovis la dentojn. Ili ne estis en la buŝo. Ili estis for.

Johano cerbumis. Poste li iris al la telefono. Li telefonis al la najbaro, ĉe kiu estis la granda festeno, kaj demandis, ĉu ili vidis liajn dentojn. Ne, oni ne vidis sed oni promesis serĉi ilin.

La venontan tagon Johano telefonis por demandi, ĉu oni trovis la dentojn. Sed ne. Ankaŭ la sekvan tagon li vane demandis pri la dentoj. Sed la trian tagon venis sciigo ke oni trovis la buŝgarnituron.

— Bone! Tre bone! ekkriis Johano. Kie vi trovis ilin?

— Ho, ili sidis en la fromaĝo.

Estis granda festeno.

M.M.

MALLONGE

La redakcio de fama gazeto dungis novan ĵurnaliston. Ĉi tiu de la ĉefredaktoro ricevis bonajn konsilojn: Ĉiam skribu mallonge! Skribi mallonge estas la plej grava.

La venontan tagon venis la nova ĵurnalistino kun sia unua manuskripto. Ĝi tekstis:

«Andreo Andersono ekrigardis tra la liftotubo por vidi, ĉu la lifto venis malsupren. Li fariĝis 42-jara.»

M.M.

IDEOLOGIO: ESPERANTO KAJ LA KONCEPTO DE SUPERŝTATO

En 1972, nroj 2 kaj 3, ni publikigis artikolon de Peter G. Forster, pri «Ideologiaj ŝanĝoj en la esperantomovado». Tiu juna angla sciencisto, kiu specialiĝis pri la historio de esperanto, faris je la itala esperantokongreso en Triesto, prelegon pri alia sed tamen simila aspekto de nia movado, kaj ni ĉerpas el ĝi la jenon:

NEŬTRALECO

Oni ofte diskutas en esperantaj rondoj la problemon de neŭtraleco. Oni diras, ke esperanto estas neŭtrala lingvo, aŭ ke esperantaj organizoj estas neŭtralaj rilate al politiko kaj religio. Oni trovas, ke la gvidantoj de la movado parolas pri neŭtraleco, sed diskutado pri tiu temo estas ankaŭ rimarkebla ĉe ordinaraĵaj membroj. Do, en la ĝenerala tradicio de la movado tiu koncepto de neŭtraleco estas grava. Tamen la enhavo de tiu koncepto de neŭtraleco estas tute malklara. Mi intencas argumenti, ke neŭtraleco en si mem estas parto de la ideologio de la esperantomovado.

NORMORIENTITAJ KAJ VALORORIENTITAJ MOVADOJ

Sociologie oni ĝenerale diras, ke estas du specoj de sociaj movadoj, — la normorientitaj kaj la valororientitaj. La normorientitaj movadoj interesas sin nur pri mallarĝa temo, ekzemple pri la konservado de malnovaj konstruaĵoj. La valororientitaj movadoj kontraste interesas sin pri la antaŭenigo de vastaj celoj, ekzemple pri la antaŭenigo de monda frateco. Plejofte movadoj enhavas miksaĵon de ambaŭ tendencoj, sed estas sufiĉe facile dividi ilin inter la du tendencoj.

LA ESPERANTOMOVADO — ĈU NORM- AŬ VALORORIENTITA?

Oni devas konsideri, ĉu la esperantomovado estas norm- aŭ valororientita. Tio estis problemo en la tuta historio de la movado. Ekzemple de Beaufront atakis la koncepton de esperanto kiel ideologio, argumentante ke ĝi estas nur lingvo. Kontraste en la paroladoj de Zamenhof oni aŭdas multe pri la valoroj de esperanto kaj relative malmulte pri la praktika utileco de la lingvo, kvankam tiu lasta ankaŭ estis grava por Zamenhof.

Necesas unue konstati ke la lingvo mem estas parto de la ideologio de movado — lingva ŝanĝo povas esti tre grava ideologia ŝanĝo, kaj la polemikoj pri Ido estas bona indiko de tio. La netuŝebleco de la fundamento estas grava parto de la ideologio de esperanto.

SUPERŜTATO

Oni ankaŭ trovas la koncepton de esperanto kiel superŝtato. En Cambridge Zamenhof parolis pri «Esperantujo». Oni trovas ekster esperanto, ke la lingvo estas grava solidargilo, kaj tion oni ankaŭ trovas por esperanto. Oni komence povas vidi ke la ideologio de la esperanta superŝtato estas neŭtraleco. Zamenhof diris, ke en aliaj kongresoj internaciaj, neŭtraleco estas nur afero de taktiko, sed la celo mem de esperantaj kongresoj estas neŭtraleco, aŭ pli ĝuste la neŭtraligo de intergentaj rilatoj. Ankaŭ Zamenhof insistis ke esperanto ne eniru la internan vivon de la gentoj, sed ke ĝi estu nur ponto inter la gentoj. Kelkfoje oni havas la impreson, ke la esperantisto havas du lojalecojn: al sia propra lando kaj al la esperantista popolo. La fondiĝo de UEA estis en si mem paŝo sur la vojo al la koncepto de esperantista superŝtato. UEA celis ek de sia komenco proponi servojn de delegitoj — kaj oni rimarkas ke unue oni parolis ne pri delegitoj, sed pri konsuloj.

ESPERANTISTA POPOLO

Pri la esperantista popolo oni ankaŭ parolis dum la Ido-skismo. Oni povas perfidi la esperantistan popolon, kaj la strukturo de la lingvo estas sankta simbolo por tiu popolo. Eksteruloj ne povas proponi ŝanĝojn sen la konsento de la esperantista popolo, kaj vere estas malkonsilinda afero por membroj de tiu popolo proponi ŝanĝon. Zamenhof riproĉis al Gaston Moch, esperantisto ĉe la delegitaro kiu voĉdonis por la ŝanĝoj, kiuj finiĝis en Ido, ke li perfidis la esperantistan popolon.

La idistoj siaflanke kritikis la ideon, ke la patriota esperantisto devas esti lojala al la fundamento. La idistoj ne emfazas la nocion de idista popolo — Ido estas praktika helpilo. Oni trovas, ke la idistoj malpli interesas sin pri la esprimaj simboloj por la subkulturo de la movado, ekzemple originala literaturo. La plej grava perfidulo por la esperantistoj estis de Beaufront (verŝajne la kreinto de Ido), kaj tiu lasta diris ke esperanto estas nur lingvo, malkonsentante kun la ideo de esperantista popolo.

NASKIĜO DE UEA

Ĝis la Ido-skismo, la esperanta popolo ne havis registaron, krom la neadekvata Lingva Komitato. Dum la debatoj pri organizado estas interese, ke ĉiuj konsentis kun la ideo de Akademio, sed multaj, eĉ fortaj fundamentistoj, kontraŭstaris la ideon de pli vasta parlamenta organizo.

La plej grava debato pri la organizado estis pri la du konfliktaj bildoj de la organizo de la movado: ĉu ĝi estu internacia aŭ supernacia. UEA jam komencis organizi la esperantistojn mondscale senrilate al na-

cioj, dum aliaj volis nur ligo de naciaj movadoj.

La mondskala organizo de UEA kun sidejo en neŭtrala Svislando bone efikis en la unua mondmilito. La fondinto Hector Hodler filozofis pri UEA kaj la lojaleco de la membroj. En 1915 li memorigis la membrojn, ke la esperantisto havas la devon memori, ke la malamikoj estas finfine homoj.

Pro la helpo kaj servoj dum la milito kaj la sidejo en neŭtrala lando, la prestiĝo de UEA altiĝis kaj tiu organizo ne plu povus esti preterlasita de nova monda organizo. La supernacia koncepto de UEA estis tamen pli radikala ol la ideoj de ligo de naciaj movadoj.

SAT — SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Tute alia starpunkto pri neŭtraleco troviĝas ĉe SAT. Kvankam ankaŭ socialista, SAT fondiĝis sur la jam ekzistanta ideologio de esperanto. La fondinto, Eugene Lanti, respektis Zamenhof kaj la vokon al la amasoj anstataŭ al la famuloj kaj politikistoj. Lanti ankaŭ aprobis la supernacian strukturon de UEA, sed li ne povis akcepti ĝian politikan neŭtralecon.

SUPERNACIA LOJALECO PLI GRAVA OL LA NACIA

SAT emfazis la supernacian tendencan ĝis la punkto kie supernacia lojaleco estas pli grava por la esperantisto ol la nacia. Lanti konstatis mankon de sennaciisma klerigo pro la malsukceso de la francaj kaj germanaj sindikatoj pri malakcepto de la unua mondmilito. SAT laŭ Lanti estis pli eduka ol politika, kaj Lanti opiniis, ke esperanto en si mem estas radikala. Oni rimarkas, ke Lanti absolute malaprobis naciismon eĉ tiam, kiam temis pri movadoj de nacia liberigo. Lanti ne konsideris sin franco kaj uzis esperanton kiel sian hejman lingvon.

DU KONCEPTOJ DE NEŬTRALECO

Oni trovas dum la tuta historio de esperanto tiujn du konceptojn de neŭtraleco:

La unua (pli praktike aplikebla sed malpli radikala) indikas ke esperanto estas nur pontlingvo kaj ne eniras la internan vivon de la gentoj. La dua (pli radikala, sed malpli praktike aplikebla) proponas ke esperanto ja eniru la internan vivon de la gentoj kaj de la vera patriota lojaleco de esperantistoj estas al Esperantujo. Iuj proponus kompromison, dirante ke la unua estu apogata por tuja aktiveco, dum la pli radikala koncepto estu afero de la estonteco.

La dua koncepto forte akcentas la koncepton de esperantista popolo, sed eĉ ĉe la unua oni povas trovi elementojn de tio. Zamenhof proponis universalan religion por la esperantistoj kiu povus ligi ilin unu kun la alia.

En la ĝenerala konversacio de esperantistoj oni trovas la koncepton de Esperantujo — la ideo ke la parolantoj estas ligitaj de forta ligo de solidareco. Tiu lasta ideo troviĝas en la nuna statuto de UEA.

Ankaŭ en la organizado de la movado

estas analogioj kun ŝtato. Ni havas niajn Palacajn Revoluciojn.

LA PROBLEMO POR LA SUPERNACIA KONCEPTO

Ĝi estas la grado en kiu ĝi estas efektivebla. En ĉiu ajn socio estas tre fortaj regantaj **naciaj** valoroj, kaj oni ĝenerale trovis, ke esperantismo **en si mem** ne estis sufiĉe forta konvinko por superregi ilin. Tio ne ĉiam estis la okazo ĉe esperanto ligita kun aliaj ideologioj.

Peter G.Forster

FORPASIS: G. NORLING

Mortis Gösta Norling, Uppsala, 75-jara.

Norling apartenis al la plej konataj svedaj esperantistoj kaj laboris tre aktive dum pluraj jardekoj. Li apartenis dum pluraj jaroj al la estraro de SEF, kaj dum 35 jaroj li estis prezidanto de la Esperantosocieto de Uppsala. Kun sia edzino Margit li estis preskaŭ konstanta partoprenanto je la jarkongresoj de SEF, kaj li vizitis multajn universaliajn kongresojn.

Naskiĝinta en Gävle li eklaboris en la tajpmasina branĉo, kaj en 1935 li startis «Uppsala skrivmaskinsaffär», kies direktoro li fariĝis kiam, en 1969, ĝi estis registrita kiel akcia societo. Li estis unu el la pioniroj de la Federacio de la svedaj vendistoj de kontormasinoj kaj apartenis al ĝia estraro dum multaj jaroj.

Gösta Norling estis entuziasma samideano, al kies saĝaj kaj realecaj konsiloj oni volonte aŭskultis.

ÅB

SEKVONTA NUMERO

Lasta dato por manuskriptoj: **20-a de aprilo**. (La redaktoro estos forvojaĝinta la tutan monaton majoj).

VACKRA BREVMÄRKEN FÖR ATEN

1 karta 1:50
3 kartor 3:25

Beställ genom inbetalning till postgiro
14 74 29 - 5 (Esperantoförbundet, Specialkonto, Malmö)

EŬROPA DOKUMENTARO

Tre grava revuo por nia eŭropa agado.

Proveksempleron sendas:
Centro por Europa Edukado,
37 rue de Veeweyde,
B-1070 Bruselo, Belgio

Sveda abonprezo: 25 skr ĉe

ESPERANTOFÖRLAGET
Fack, 200 42 Malmö, Postgiro 578 - 5

SKANDINAVIA AVIADILA KARAVANO

unusemajna al Ateno 31 julio — 7 aŭgusto per koneksaj aeroplanoj en Arlanda, Torslanda, Malmö kaj Kopenhago.

Petu informojn kaj aliĝilojn ĉe:
S-ro E.W. Anjou, Södra vägen 6
S-412 54 GOTENBURGO, Svedio.

BÖCKER

(skönlitteratur, läroböcker o.a.)
på esperanto, engelska, tyska, franska och svenska ämnar jag gallra ut ur mitt bibliotek inför förestående flyttning. Förteckning mot brevporto.
Sune Ahlm, Parkvägen 9, 460 60 Vargön
(Efter 1 maj blir det Nygatan 20 A, 462 00 Vänersborg)

HELSINGØR, DANLANDO MONDKONATA KURSLOKO

La internaciaj FERIAJ Esperanto-Kursoj okazos la 18-an ĝis 24-an de julio 1976. Ni invitas vin veni por ĉeesti kaj ĝui neforgeseblajn tagojn en internacia rondo. Kaptu la okazon komenci aŭ perfektigi en la Internacia Lingvo.

Programo senpage havebla ĉe:
S-ino Eva Langkilde
Ingemansvej 18
DK-3000 Helsingør
Danlando

Ibra Radio sänder åter program på esperanto och nu från Radio Mediteranea, Malta, varje **tisdag** mellan 21.30 och 21.45 svensk tid. Våglängd 49,55 m (= 6.055 MHz). Programmet kallas «La goja espero».

Lyssna och rapportera till Ibra Radio, Box 396, 101 25 Stockholm, om hörbarhet och vad ni tycker om programmen. Endast om sådana rapporter inkommer, kan vi få esperanto-utsändningar i fortsättningen.

Mi deziras korespondi kun la tuta mondo per poŝtkartoj kaj leteroj. Mi volonte helpas turistojn, kiuj vizitos mian urbon. Petro Kolodziej, PK 31, PL-44-101 Gliwice, Pollando.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Adreso: Esperantoförlaget, Fack,
200 42 Malmö
Ejo: Möllevångsgatan 20 B
Dejortempo: 1 sept — 15 maj: merkredo
10 — 11, ĵaŭde 17 — 18.
Skribaj mendoj ekspedatuj dum la tuta jaro,
ankau dum somero.
Telefona: 040 - 12 20 29. Postgiro: 578 - 5.
Administranto: Anna-Greta Strönné.
Helpanto: Wivi Nilsson.
Prezidanto: Åke Blomberg

Konstrui per

YTONG®

estas konstrui

ekonomie

brulsekure

YTONGBOLAGEN

Hällabrottet

KOMPOSTADO: TIEL ĜI FUNKCIAS

Kiel ni menciis en artikolo en la antaŭa numero de *La Espero*, la sveda esperantomovado nun posedas propran fotokompostilon. Tiu ĉi numero de la gazeto estas kompostita per ĝi. Mankas daŭre speciala «disko» kun la esperantaj literotipoj, sed ĝi estas mendita kaj baldaŭ venos.

La maŝinaro konsistas el tri unuoj: *bendtruigilo*, *fotounuo* kaj *rivelilo*. La bendtruigilo estas iaspeca tajpilo, nur ke ĝi nenion tajpas: anstataŭe ĝi registras la «tajpitajn» literojn kiel truojn sur speciala papera bendo. Ĉiu litero estas nome «kodo», je kiu la fotounuo reagos.



Ĉiuj literotipoj troviĝas sur tiaspeca disko, kiu rondiras konstante en la fotounuo.

La fotounuo estas esence komputoro, kiun la trubendo gvidas. Ĉiu trugrupo sur la trubendo donas al la komputoro informon pri kiu litero temas. La literoj troviĝas sur speciala «disko», kiu daŭre turniĝas en la foto-


Sondagen den 25 april äger skriftliga provrum för

EXAMEN I ESPERANTO

Anmälan: *högre examen* till Ebbe Vilborg, Prästgårdsängen 2, 412 71 Göteborg, tel. 031 - 40 52 74

Lägre examen till Oskar Svantesson, Skonertgatan 1, 421 74 Västra Frölunda, tel. 031 - 29 03 81.

SVENSKA ESPERANTO-INSTITUTET



Kiam oni «tajpas» produktiĝas trubendo, kiu gvidas la kompostadon en la fotounuo

unuo. Kiam la ĝusta litero preterpasas, tiam speciala lampo fulmrapide projekcias tiun literon sur fotopaperon, literon post litero, vorton post vorto. La komputoro ankaŭ elkalkulas, kiom da interspaco lasi inter la vortoj, por ke la dekstra margeno fariĝu rekta.

La fotopaperon, kiu troviĝas en speciala kaseto, oni enigas en etan rivelilon — kaj ekaperas preta teksto sur ĝi.

Ĉu ŝajnas komplikita? Ŝajnas komplikita fakte ankaŭ al ni, kiuj kompostis tiun ĉi numeron de *La Espero*. Sed tamen funkciis en ordo. Ni faris multajn erarojn, sed ni lernis iom el ili. (Espereble vi ne rimarkos ilin — ja ne temas pri simplaj «preŝeraroj»).

Kompostado de *La Espero* estas nur flankafero. La kompostilon ni uzos por komposti la novan grandan svedan-esperantan vortaron. Kaj tiu tasko estas multe pli komplikita ol kompostado de simpla gazetartikolo. Tial estas bone komenci per io simpla, *La Espero*, kaj spertiĝi je tiaspeca kompostado.

La plej grava manko daŭre estas la manko de esperantaj supersignoj. Ni devis meti ilin aparte, mane. Se ili ne ĉiam aspektas tute decaj, pensu ke estas nur portempa solvo. Baldaŭ venos la nova «disko».

Franko Luin

Läst & hört

Det har varit mager skörd i klipplådan under tiden slutet januari till början av mars. En liten fråga från «frågvis Ida» i Ica-kuriren har blivit flitigt läst, trots att frågan själv bara var på sex rader och svaret var kortfattat. Det går rykten om en artikel i Fabriksarbetaren nr 4/76, men ännu har inget klipp nått Esperantoförbundets expedition.

Här kommer några smakbitar ur tidningsklippen. En komplett lista över klippen finns att få för den som är intresserad. Har du sett något i någon tidning, så sänd det till Esperantoförbundet, Fack, 122 04 Stockholm-Enskede.

Ulla Luin

ICA-kuriren

Fråga: Jag har ett par frågor beträffande konstruerade språk. Finns det fler än esperanto? Vem «uppfann» esperanto och när? Finns någon förening för esperantovänner?

Västmanlands Läns Tidning

Greken eller bulgaren däremot kanske aldrig får chansen att visa vilken underbart trevlig sällskapsmänniska eller god klasskom-

pis han är, därför att han på grund av språket blir isolerad eller blir hänvisad att endast umgås med sina egna landsmän. Massor av misstänksamhet, fördomar, osämja mm skulle kunna undanröjas om vi hade esperanto införd över hela världen som ett internationellt andraspråk.

ur insändare av S Ericsson, 9 mars

Helsingborgs Dagblad

Under ledning av föreningens ordförande, Inga Magnusson, har Helsingborgs esperantoförening hållit det 42:a årsmötet.

Som ett led i föreningens kulturella verksamhet har anordnats särskilda föredragsaftnar samt utbyte med andra länders esperantister, varvid särskilt kan framhållas det årligen återkommande besöket i Helsingborg av den internationella esperantokursen från Helsingør med deltagande från ett flertal olika länder.

Förutom medlemskap i olika esperantorganisationer är föreningen medlem i ABF, Skådebanan, Helsingborgs ungdomsråd samt ansluten till folk rörelsearkivet.

2 feb 1976

La Espero

Tidningsbilaga medföljer

Organ för Svenska Esperantoförbundet, Fack, 122 04 Stockholm-Enskede.

Besöksadress: Hägervägen 31. Postgiro: 20 12 - 3.

Ansvarig utgivare: Bertil Åkerberg

Redaktör: Åke Blomberg, Lidåkersgatan 6 C, 531 00 Lidköping.

Telefon: 0510 - 286 42 (arb. 0510 - 221 30).

Medlemsavgift för direktansluten medlem 30 kr, ungdomsmedlem 15 kr, familjemedlem utan tidning 10 kr.

Prenumerationspris 30 kr.

Förbundets sekretariat är öppet onsdagar kl. 18 — 20, tel. 08 - 48 99 76.

Tryck: Sturetryckeriet AB, Stockholm 1976

Svenska Esperantoförbundet

ENSKEDE

Postgirokonto nr 20 12 — 3

MEDDELANDE**Esperantoförbundets årskongress, Skellefteå 12—13 juni 1976**

Deltagaravgift 25:—

Ungdomar —25 år 10:—

Tilläggsavgift för 14—18 juni 75:—

Ungdomar—20 år, pensionärer, familj 30:—

Hotellreservat

Enbäddrum (50—60 kr) eller tvåbäddrum (75—90 kr) kan reserveras på inbetalningskortet, men skall betalas till hotellet. Ange ankomstdag och avresedag. Reservationen kostar 15:—.

Anmäl dig före 15 maj.

Avskiljs före inbetalning eller girering.

POSTGIROT		Mottagardel	INBETALNING / GIRERING B		Arkivdel	2 • Konto • Avg • Bel •
Meddelande till betalningsmottagaren			Till postgirokonto nr		Avgift	I-stämpel/Datumstämpel
<input type="checkbox"/> Deltagaravgift 12—13 juni 1976: 25:— / 10:— <input type="checkbox"/> Tilläggsavgift 14—18 juni 1976: 75:— / 30:— <input type="checkbox"/> Utfärd 18 juni natten: 75:— <input type="checkbox"/> Hotellreservat, ankomst avresa: 15:—			20 12 — 3			
Avsändare (namn och postadress)			Betalningsmottagare (endast namn)			
			Svenska Esperantoförbundet			
Avsändare (namn och postadress)			Avsändare (namn och postadress)			
			Eget kontonr vid girering		Underskrift vid girering från eget konto	
Till postgirokonto nr			Kronor		öre	
20 12 — 3						
			Kronor		öre	
					Tidningsbilaga	

I FÄLTET NEDAN FÅR ANTECKNINGAR INTE GÖRAS - RESERVERAT FÖR MASKINELL LÄSNING

20123#02#